

## Diru tridek tri

[el la Itala Esperanto-Federacio revuo "L'esperanto"]

de Renato Corsetti

### 4) Graecum est, non legitur! È greco. Non si capisce!

Ni estas laŭdifine la filoj de tiu Romo, kiu regis la mondon, kaj la nepoj de tiuj grekoj, kiuj mense regis la mondon. Tion scias ĉiu de mia generacio. Tiuj de la plej juna generacio ne ankoraŭ klare scias, ĉu parte iliaj prapatroj naskiĝis en Teksaso, sed tiu estas alia rakonto.

Estante nepoj de la grekoj ni ŝatas paroli greke. Ĉu vi preferus esti "necroforo" aŭ "becchino", ĉu "dermatologo" aŭ "medico della pelle", ĉu "cinologo" aŭ "medico dei cani"? Aŭtomate en la itala ni uzas amaseton da grekaj kaj latinaj radikoj, kaj tio estas nur nia intern-itala problemo. Ĉu vi konas la malnovan ŝercon:

- Kuracisto al paciento: *Lei ha una cardiopatia!*
- Paciento: *E da che viene, dotto'?*
- Kuracisto: *Dal greco!*

Sed la problemoj komenciĝas, kiam ni transportas tiun uzon al Esperanto. La potencialaj aŭskultantoj, germanoj aŭ mongoloj, ne nepre komprenas la grekan.

En libro ĵus eldonita en Italujo mi trovas, ekzemple:

"megaŝafejo"

por traduki la italan (la itala teksto estas fronte) "megaovile". Certe en Italujo ĉefe en la junulara ĵargono, sed ankaŭ pli ĝenerale "mega" estas tute komprenebla en la senco de "grandega", "bonega", "belega", sed ĉu ni certas, ke ankaŭ en Esperanto? Bonvolu ne diri al mi, kiel kutime diras Piervittorio Orlandini, nia komuna amiko en Grosseto, ke ĝi estas en PIV. PIV (Plena Ilustrita Vortaro por la komencantoj) ne estas vortaro de Esperanto sed de ties okcident-eŭropa dialekto. En ĉi tiu okazo, cetere, PIV redonas nur la teĥnikan signifon de mega-: miliono.

Kompreneble oni ankaŭ tradukas "megagalattico" per "megagalaksia", kio ne povas ne kaŭzi sinmortigon de kelkaj koreaj esperantistoj, kiuj ne sukcesas kompreni. Se oni nepre volas enkonduki en Esperanton belajn esprimojn el la itala junulara kulturo, oni almenaŭ metu klarigon per ordinara Esperanto post la vorto inter komoj: grandega kaj belega, aŭ oni metu tiun klarigon en piednoton aŭ en glosaron. Eĉ post kelkaj jaroj da studado de la greka nia korea samideano povus konkludi ke temas pri vilaĝo (al tio rilatas tiu adjektivo) de la granda galaksio.

Kaj kion pensi pri "nekronaciveterenterigejo", traduko de "necronazionalveterocimitero"?

Ĉi tie al la greka elemento "necro" aldoniĝas aliaj elementoj, el kiuj unu estas latineca, vetero, uzata en kelkaj italaj esprimoj por "malnova". Kompreneble ĝi ne povas funkcii en Esperanto kiel en la itala. "Vetero-comunista" en Esperanto estas

“malnov-komunisma” aŭ “pra-komunisma”. La fina produktaĵo produktita en la libro povas esti komprenata en Vjetnamujo kiel “enterigejo de la vetero de la nacio” kun unu neklarigebla “nekro” kaj sindemandado pri tio, kial oni enterigas la veteron en Italujo. Eble por reagi al la plivarmiĝo de la tero.

Aliflanke, la vera problemoj estas serioj kiel ĉi tiuj:

- kardiograf-o = kor-bat-registr-il-o
- kardiogram-o = kor-bat-stri-o
- kardiologi-o = kor-scienc-o
- kardiolog-o = kor-kurac-ist-o
- kardiopati-o = kor-mal-sano

(el: [http://www.bonalingvo.it/index.php/Simplaj\\_samsignifaj\\_vortoj](http://www.bonalingvo.it/index.php/Simplaj_samsignifaj_vortoj) kun adaptoj).

da kiuj ekzistas multaj pli ol ni povas imagi. Bonvolu ne troigi al unu flanko aŭ al la alia. Ekzemple Claude Piron diras, ke li miras, kial en Esperanto oni diras “dentisto” por kuracisto, kiu okupiĝas pri dentoj, se doni ne diras “koristo” por kuracisto, kiu okupiĝas pri koroj...

Bonvolu ankaŭ atenti al duon-grekaj kunmetaĵoj. En la menciita libro oni trovas la tradukon de “*biodegradabile*” al “biodigradiĝema”. Eble oni pensu iom pli kaj venu al io kun “malkomponebla”. La traduko de “bio” estas efektive malfacila problemoj. En kelkaj okazoj ĝi povas esti “viv-” (kiel en “biografio”). En aliaj okazoj ĝi povas esti “biologia” (kiel en “bioteĥniko”), sed en kelkaj okazoj ĝi defias la tradukonton. Kiel vi tradukus, ekzemple, la konatan frap-frazon: *Scelgo bio!?* Ĉu “Mi elektas naturaĵojn!” aŭ pli frape “Mi elektas la naturon!”?